

# Groningen



**Helpilo por sukcesplena promonado.**

## URBOPROMENADO TRA GRONINGEN

Multe el la historio de la urbo Groningen konserviĝis.

Bona kaj agrabla maniero por sperti ion pri la famkonata historio de Groningen, estas promenadi. Ne nur laŭ historiaj konstruaĵoj ni marŝas sed kompreneble ankaŭ modernajn vidindaĵojn en la centro ni preterpasas. Kompakta centro, ĉar ene de 1 km<sup>2</sup> eblas trovi la plej rimarkindajn objektojn.

*Ni deziras multe da plezuro dumvoje.*

Ek de VVV Grote Markt nr.29 

### 1. FORUM (Forumo)

La suda flanko de la GROTE MARKT (granda vendoplaco) havas kelkajn fasadojn el la 17<sup>a</sup> kaj 18<sup>a</sup> jarcentoj. La ceteraj flankoj de la ĉefplaco estis detruitaj dum la liberigo en aprilo 1945.

La orienta flanko estas grandskale renovigita. La FORUM-planoj estas disvolvigitaj por doni novan impulson.

Celo estas rekonstruo de la antaŭmilita situacio kaj restarigo de la hejmeca etoso de la Grote Markt.

 Poelestraat

### 2. POELESTRAAT: La centro de la amuzuma Groningen

 Peperstraat

### 3. ST.GEERTRUIDS GASTHUIS

Fondita en 1405 kiel institucio por bonfara laboro.



Malriĉuloj, malsanuloj kaj pilgrimuloj ricevis loĝigon ĉi tie. Ĉirkaŭ la unua korto vi trovos preĝejon, manĝejon kaj ĉambron por la kuratoroj.

Ĉe la alia korto estas blankigejo ĉirkaŭita de malriĉul-dometoj.

*Vi forlasu la korton je la malantaŭa flanko pere de ŝtuparo malsupren.*

➡ Gedempte Kattendiep / Hoornstraatje / Steentilstraat / Rademarkt

#### **4. ST.ANTHONY GASTHUIS**

Tiu ĉi malsanulejo, fondita en 1517, origine estis ekster la urbomuro, ĉar ne nur malriĉuloj vivis tie, sed ĝia destino estis ankaŭ por pestuloj kaj mensmalsanuloj.

Ĉe la konstruo de la malsanulejo oni uzis materialon devenantan de la malkonstruita kastelo iam situinta ĉe la Rademarkt.

Vizito al la malsanulejo estas permesata.

Daŭrigu la vojon post via vizito.

➡ Verlengde Oosterstraat

#### **5. SINT JOZEF KATHEDRAAL (Katedralo de Sankta Jozefa)**

Tiu ĉi Romkatolika preĝejo estis konstruita fine de la 19-a jarcento

kiam la urbo ege grandiĝis. En la ĉirkaŭaĵo loĝis multaj laboristoj, rekta referenco al la nomo Jozef. La projekton faris arkitekto P.Cuypers, inspirite per la Broederen-preĝejo en Zutphen. La turo havas kiel moknomon Dronkemanstoren (Ebriulturo) ĉar oni ĉiam vidas du ciferojn (do duoble).

 Heresingel

## 6. HERESINGEL

En la komenco staras “De Boom” (la arbo), monumento por H.N.Werkman, membro de la artgrupo “de Ploeg” (la plugilo), kiu estis mortpafita je la fino de la dua Mondmilito.

En la fino de la 19<sup>a</sup> jarcento oni malkonstruis la remparojn kaj aranĝis bulvarojn sur kiuj oni konstruis belegajn domojn, ekzemple numeron 3 en ĉaledstilo.

## 7. HEREPLEIN

La pentristo Jozef Israëls faris la pentraĵon “Laŭlonge de la tombo de la patrino”. Sur la placo staras la skulptita versio farita de A.Hesselink. Je la transa flanko vi vidas la Tschumipavilonon. Ĝi estas podio por mediprojektoj de artistoj.

 Herestraat

## 8. HEREPOORT (Sinjora pordego)

ankoraŭ la ĉefstrato de Groningen. La ejo kie origine situis la 11<sup>a</sup> jarcenta pordego, estas markata per naturŝtono en la pavimo.

➡ Kleine Pelsterstraat, Pelsterstraat

## 9. HEILIGEN GEESTGASTHUIS



Tiu ĉi malsanulejo estis fondita en la 13<sup>a</sup> jarcento de Ordeno de la Sankta Spirito. Ilia karakteriza signo— Duobla Andreaskruco— estas videbla je diversaj lokoj. En ĉi tiu malsanulejo ne nur malriĉuloj, malsanuloj kaj maljunuloj estis prizorgataj, sed ĝi estis ankaŭ gastejo. La preĝejo estas uzata por diservoj, koncertoj ktp.

➡ Nieuwestad, Kleine Haddingestraat, Gedempte Zuiderdiep

## 10. Dienst Ruimtelijke Ordening (servo por area planizado)

Ĉi tiu konstruaĵo en la stilo de la Amsterdama Skolo estas projektita de la urba arkitekto S.J.Bouma. La fronto havas horizontalajn liniojn, dum la flanko havas vertikalan strukturon.

### LA GRONINGENA MUZEO

La muzeo (1994) estas projektita de Mendini, De Lucchi, Starck kaj Coop Himmelb(l)au. Ĝi havas konstantan kolekton kaj variajn ekspoziciojn (regionajn, naciajn kaj internaciajn).

La skulptaĵo antaŭ la muzeo estas de Mendini kaj estas mapo de la muzeo. La du leonoj devenas el la en 1811 malkonstruita Groningena burĝodomo en Farmsum kaj montras ke la muzeo ankaŭ gastigas la historian rakonton de Groningen. Kiam la muzeo-ponto malfermiĝas: atentu la malsupran flankon. Sur ĝi W.Delvoye konstruis kahelaran scenon el Delfta fajenco kiu montras fantaziajn infanludojn.

### **STATIONSPLEIN ( Stacidoma placo)**

La monumenta konstruaĵo el Nederlanda-Flandra gotiko kun renesancaj detaloj estas projekto de I.Gosschalk (1895). La impona halo estas bela ekzemplo de Jugendstil.

La ornamaĵoj sur la plafono estas faritaj el muldokartono kaj sur la kahelaj scenoj estas bildigitaj Laboro, Tempo, Poŝto, Telegrafio kaj la Groningena virgulino. Antaŭ la stacidomo oni realigis urban plataĵon



sur kiu sin paŝtas “Peerd van ome Loeks”, (la ĉevalo de onklo Loeks) kaj sube troviĝas kelo por pli ol 5000 bicikloj.



**Folklingestraat**

### **11. SYNAGOGE (SINAGOGO)**

Groningen havis grandan Judan komunumon kaj pro tio estis konstruita en 1906 nova pli granda sinagogo. La arkitektoj T.Kuipers kaj G.v.d.Veen planis konstruaĵon Maŭrostilan.

En 1980 estis decidite renovigi la konstruaĵon kaj post unu jaro ĝi denove estis konsekrita kiel sinagogo.

## 12. FOLKINGESTRAAT

La centro de la malnova Juda kvartalo estas nuntempe surpriza butikumstrato kun ĉiaj amuzaj bagatelaĵoj kaj vestoj el ĉiuj kompasdirektoj. Por vivteni la rememoron al la Juda socio kvin artistoj metis je diversaj lokoj en la strato artaĵojn. Antaŭ ol aliri la **VISMARKT** (fiŝbazaro) vi vidas maldekstre je la angulo la plej malnovan kafejon de la urbo: Huis de Beurs.

## 13. KORENBEURS / GRENBORSO



Tiu ĉi novklasika borso, konstruaĵo el 1865, estas projekto de la urba arkitekto J.G. van Beusekom. La fasado estas ornamita per tri statuoj, Merkuro, Neptuno kaj Cereso. La speciala gisa supra konstruaĵo kun multaj fenestroj kaŭzis bonan lumfaskon, ĝi estas necesa por ekzamenado de la grenoj.

## 14. La AA-preĝejo kaj turo

La okulfrapa turo estis rekonstruita en la jaro 1718.

**15. Norda Ŝipmuzeo** troviĝas en la plej malnova domo de la urbo.

**Pisejo por viroj** estas konstruita de la fama nederlandaj arĥitektoj Rem Koolhaas kaj Erwin Olaf.

Antaŭa Groningena muzeo estas nun parto de la Hanze-altlernejo.

**Komiksa Muzeo** - ne plu ekzistas

## **16. Hoge kaj Lage der A** (Alta kaj malalta A)

En la mezepoko Groningen estis grava komerca centro kun multaj bierfarejoj. Vidu la grandajn vardomojn.

## **17. Harmonie-konstruaĵo**

La Universitato havas du fakultatojn ĉi tie. Troviĝas busto de Aletta Jacobs, la unua virino en Nederlando kiu ekstudis en la universitato.

**18.** Ĉi tie en 1614 estis fondita la dua universitato de Nederlando. La nuntempa konstruaĵo estis konstruita en la jaro 1909.

## **19. Oude Boteringestraat**

En tiu ĉi grava aristokrata strato estas multaj malnovaj domoj.

## **Ossenmarkt** (Bova bazaro)

Sub ĝi troviĝas unu el la plej belaj aŭtoparkejoj.

## **20. Spilsluizen**

En 1876 la kanalo havis liberan ligon kun la maro. Vi ankoraŭ vidas la kajojn por basa kaj alta tajdoj.

## **21. Voormalige Apotheek** (Iama Apoteko)

Sur la angulo kun la Turfsingel estas videbla la speciala elpendaĵo de iama apoteko. La cervo kun granda kornaro referencas al raspita cervokorno, kiun oni iam uzis kiel kuracilon.





## 22 VROUW WILSOORS– OF AAFIEN OLT HofSGASTHUIS

Tiu ĉi restaŭrita malsanulejo estis fondita en 1766 kaj estis celita por maljunuloj. La spalirtiloj servis somere kiel sunŝirmilo kaj tiel la loĝantoj ne tro varmiĝis.



Kontraŭ la malsanulejo malantaŭa enirejo de Prinsentuin

## 23 Prinsenhofĝardeno



La promenĝardeno renesancstila estis konstruita en 1625 kaj konsistas el botanika ĝardeno kun kelkaj antikvaj fruktarbo-rasoj, rozejo, kovritaj fagaraj heĝoj kaj buksoĝardeno kun la inicialoj

de vicreĝo Willem Frederik kaj lia edzino Albertina Agnes. Dum la somermonatoj la botanika ĝardeno funkcias ankaŭ kiel teotrinkĝardeno. Super la enirejo troviĝas belega sunhorloĝo. La ĝardeno estas somere (1 aprilo - 1 nov.) malfermita de la 10<sup>a</sup> matene ĝis la 18<sup>a</sup> vespere kaj vintre (1 nov. - 1 apr.) de la deka ĝis la 16.30<sup>a</sup> horo.

## 24 Prinsenhof

Tiu ĉi komplekso estis konstruita en la 15-a jarcento, origine kiel monaĥejo, poste interalie uzita kiel episkopa sidejo, vicreĝa palaco, militista malsanulejo, kazerno kaj studioj por la regionaj elsendoj.

En la konstruaĵoj estas realigitaj hotelo kun restaŭracio kaj apartamentoj.



Vi forlasas la ĝardenon tra la pordo kun sunhorloĝo / Turfsingel / Turfstraat/ Gardepoort Martinikerhof.

## **25. PROVINCIEHUIS**

La provinca domkomplekso konsistas el kvar partoj. La fronto estas el neorenesanca stilo ( J.A.Vrijman). La maldekstra fasado el Bentheimer grejso datiĝas de 1559 kaj estas nomita: “Het Huis met de Drie Koningskoppen”( La domo kun la tri reĝaj kapoj).

Malantaŭe troviĝas la plej malnova parto, la iama Latina lernejo, la lernejo de Sankta Martino. Atentu ankaŭ la plej malgrandan strateton de Groningen la “de Kleine Snor” (malgrandaj lipharoj).

Per paŝkrado estas ligo kun la nova parto el 1993.

## **26. MARTINIPREĜEJO**

La preĝejo fontas el ligna preĝejo kiu dum la jarcentoj elkreskis al la hodiaŭa 15<sup>a</sup> -jarcenta gotika halojpreĝejo. En la mezepoko pilgrimantoj venis al ĉi tiu preĝejo por rigardi relikvon (brakon de Johano Baptisto). La orgeno de la Martinipreĝejo devenas de antaŭ 1450 kaj estas unu el la plej antikvaj instrumentoj de nia lando.

## **28. MARTINITURO**

La 15<sup>a</sup> -jarcenta Martinituro estas la fieraĵo de Groningen kaj estas ofte nomata de la Groningenanoj ‘d olle Grize, pro la koloro de la erodiĝinta Bentheimer grejso.

La turo altas 97 metrojn kaj estas surgrimpebla. Turo kaj preĝejo estas nomitaj laŭ Sankta Marteno, la patrono de la urbo.



© Esperanto sekcio Noord Nederland

En la vintra sezono kunvenas unu fojon en du semajnoj.

Klubejo: W.Dreesstraat 1 , 9728 SW Groningen

Info: Ineke Emmelkamp

Arubastraat 12

NL—9715 RW Groningen

Retpoŝte: [info@esperanto-Nederland.nl](mailto:info@esperanto-Nederland.nl)